

## *Aŭtonomio kaj Amo<sup>1</sup>-Kompato<sup>2</sup>*

*Ĉiuj tremas antaŭ vergo.  
Ĉiuj timas antaŭ morto.  
Ekzemplon el vi mem farinte  
Ne mortigu, nek mortigi igu.*

(La Dharmo-Pado<sup>3</sup>, 129)

*Vi faru vin mem via insuleto, via rifuĝejo,  
Ne serĉante eksteran rifuĝejon;  
Vi faru la darmon via insuleto, via rifuĝejo,  
Ne serĉante alian rifuĝejon.*

(La Sutro de Granda Perfekta Nirvano<sup>4</sup>, 35)

Se budhismo celas solvon de homaj suferoj, ni budhanoj devas paŝi sur la vojo kondukanta al la mondo, en kiu kruelaĵoj, interalie mortigo, ne estas vidataj. “Ne mortigu” en la 129a verso de “La Dharmo-Pado” aspiras la mondon sen mortigo pere de ĉies personan decidon kaj praktikadon. Por tio necesas, ke ĉiu bone regu sin mem. Violento kaj mortigo fare de individuo estas kaŭzitaĵ de malbonaj sentoj, ekzemple kolero kaj venĝemo; tial estas efike praktiki meditadon por kvietigi sian menson.

Sed por “ne igi mortigi” ne sufiĉas persona mem-regado. Se temas nur pri “ne mortigi”, persona strebado al mem-regado estas la prioritata tasko. Aliflanke “igi mortigi” konsistas el la tri eroj: mortigato, mortiganto, kaj mortigiganto. Tio ĉi sugestas al ni socialan aferon superantan privatan nivelon, ĉar por la ago “mortigigo” estas ebla nur en la homa rilato de mortigiganto kaj mortigigato, nome de ordonanto kaj ordonato. En tiu ĉi kunteksto iganto estas pli forta kaj igato malpli forta. Milito estas tipa okazo; generalo ordonas soldatojn mortigi alilandanojn. Se milito okazas, preskaŭ neniu kuraĝas ne sekvi ordonon de superuloj, ĉu ne? Fundamenta kaj radikala efektiviĝo de la instruo “ne igi mortigi” havas la antaŭkondiĉon, ke la socio kun devigo kaj diskriminacio estu reformita.

Tiusece tre gravas la ĉi tie citita verso de “La Sutro de Granda Perfekta Nirvano”, instruante al ni la necesecon de aŭtonomio aŭ mem-stareco. Tio estas la bazo de aŭtonomio kaj egaleco, kiuj garantias demokratian socion. Demokratio ne estas la plej ideala sistemo, kiel Winston Churchill atentigis iom sarkasme, sed pli bona ol ĉiuj ĝisnunaj aliaj sistemoj. Ni devas tamen konscii, ke demokratio facile degeneras al mobokratio<sup>5</sup>, se aŭtonomio ne estas sufiĉe penetrita en ĉies spiriton kaj agadon. Estas stulte, se oni decidas sian opinion nur sekvante majoritaton aŭ kutimon aŭ tradicion aŭ prestiĝon aŭ io ajn senkonsidere al ilia praveco. Ĉi tie per la vorto “praveco” mi sugestas “darmon” en budhisma kunteksto.

Ŝakjamunio neniam ordonis al siaj disĉiploj, neniam rekomendis iun fariĝi lia disĉiplo, neniam devigis iun sekvi la vojon de li sugestitan. Li nur daŭrigis dialogon kun multaj homoj, same kiel

---

<sup>1</sup> sanskrite: *maitrī*, palie: *mettā*

<sup>2</sup> sanskrite kaj palie: *karuṇā*

<sup>3</sup> *Dhammapada*. La teksto estas tradukita de Gunnar Gällmo.

<sup>4</sup> *Maha-parinibbana Sutta*. La teksto estas tradukita de mi mem.

<sup>5</sup> angle: *mobocracy*. regado fare de plejmulto, senkonsidera al praveco.

Sokrato, kaj vekis ĉe ili motivon al bodio. Ni devas mem decidi ion ajn surbaze de darmo, ne simple sekvante eksteran ordonon aŭ prestiĝon.

Kiel jam dirite, por solvi homajn suferojn ni devas unue regi nin mem, sed ankaŭ ekspansii nian perspektivon al socia nivelo. En antaŭmoderna tempo budhismaj sanktuloj predikadis, ke ni devas elteni nunajn situaciojn subigante nian memon, kaj eĉ erare diradis, ke la instruo de ne-egoeco (*anatta*) estas malaprobato de aŭtonomio. Tia instruo bone akordis kun socia regantaro, ĉar ĝi volis ekstermi kontraŭstaron de regatoj. Antaŭ la dua mondmilito en la japana budhisma medio la ĉefa fluo aprobis kaj subtenis "sanktan" militon, elpensante diversajn ĉikanojn. Tio estas nigra historio de budhismo.

Nun ni devas imagi, kiel la homoj en la mondo suferas. Ni rememoru la instruon de amo-kompato. Amo-kompato kaj saĝo ne estas du apartaj aferoj. Ili estas du flankoj de unu monero. Ju pli profunden ni rigardas nian internon, des pli klariĝas, ke nia ekzisto dependas de ĉio, kio ŝajnas esti ekster ni sed vere kondiĉas kaj ebligas nian ekziston. Tio estas la leĝo de dependa ekesto<sup>6</sup>.

Ni vidu ekzemple: en 2021 ĉ. 828 milionoj da homoj en la mondo suferas pro malsato. Ĉu la kaŭzo estas manko de produktataj nutroprovizoj? Ne. Ĉiujare oni produktas 2,700 milionojn da tunoj da grenoj, kiuj povas sufiĉe nutri 8 miliardojn da homoj. La vera kaŭzo de malsato estas ekzisto de riĉegaj landoj kaj homoj, kiuj konsumas pli ol sufiĉe kaj eĉ forĵetas manĝaĵojn. Tio estas unuflanke la problemo de individua avidemo sed samtempe la problemo de monda malegaleco, diskriminacio kaj maljusteco. Tio ĉi estas nur unu ekzemplo. Sen fundamenta kaj radikala reformo de nia socio mondscale la solvo de homaj suferoj ne eblas. Ni budhanoj havas respondecon almenaŭ havi intereson en sociaj problemoj, kaj fari ion, eĉ etan, farendan.

**Yamaguti Sin'iti**

---

<sup>6</sup> sanskrite: *pratītya-samutpāda*, palie: *paṭicca-samuppāda*